

# Eŭropa Bulteno

---

Junio 2020, Numero 203

---

## ADIAŬO



Estimataj legantoj,

tio ĉi estas mia lasta adiaŭa sinturno al vi. Min suferigas miaj autoimunaj malsanoj jam 8-9 jarojn sed ĝis nun ili lasis mian cerbon aktivi kaj por EEU kaj por tiu ĉi bulteno. Nun tio ĉesis. Mi ne povas koncentriĝi al iu ajn teksto kaj provas kunmeti tiun ĉi teksteton kiu estos lasta mia resumo de mia agado kaj deziroj restantaj. De 2005, kiam mi iĝis sekretario de EEU, mi malrapide influis al evoluo de EEU serĉante manieron havi monon por projektoj kaj altigante pozicion kaj statuson de Esperanto en Eŭropaj instancoj kiel Eŭropa Parlamento kaj Eŭropa komisiono. Iom post iom ni kreis estraron kiu precize scias kion celi por ke tio ne estu utopiaj postuloj kiujn esperantistoj havis pli ol 100 jarojn, ne komprenante ke tiel ili fuŝas pozicion por Esperanto. La prezidanto de EEU, Seán Ó Riain kaj vicprezidantino Fory Witdoeck subtenis tiun ĉi celaron. Unue ni trovis sinjorinon Ljudmila Novak kiel membron de la parlamento de EU el Slovenio ekde 2007 kiu en junaĝo lernis Esperanton. Ni kontaktis ŝin kaj realigis aktivadon de informado en la EP pri Esperanto. Estas terure malfacile agi por Esperanto en neesperantistaj medioj sen laudi ĝin. Ne estas entute matura tempo por tuteuropa uzo de Esperanto. Post la ŝanĝo de la Eŭropa Parlamento kaj la Eŭropa Komisiono

ni trovis Vytenis Andriukaitis kiel mebron de la nova Eŭropa Komisiono, iam lerninta Esperanton kiu dum sia mandato ne malŝparis teampon por montri sian subtenon al Esperanto. Li aperigis dufoje siajn paroladojn en Espranto en sia paĝo sur la paĝaro de Eŭropa Komisiono.



De 2007 ni realigis kelkajn projektojn per mono de fondaĵoj de Eŭropa Komisiono, ĉefe konferencojn kaj ekspoziciojn financitajn de la programo Eŭropo por civitanoj kaj eĉ unu jaron havis subtenon de tiu programo por la regula funkciado de EEU. De 2012 ĝis 2014 EEU kunordigis la plej grandan projekton, financitan per entute preskaŭ 400.000 EUR, kies celo estis ellaboro de la paĝaro lingvo.info, daŭre funkcia kaj multe uzata de uzantoj el la tuta Eŭropo. En 2017 EEU kunlaboris pri ellaboro de la projekto Multlingva Akcelilo, financita de EU, en kiu EEU aktive partoprenis kiel asociita partnero kaj la projekto sukcesis finaranĝi en 2020. Nun landoj de EU kaj aliaj landoj havas uzeblajn materialojn per kiuj ĉiu elementa lernejo povas mem enkonduki la objekton akcelilo de multlingveco eĉ sen havi esperantistajn instruistojn.

En la nuna EP denove mambras Ljudmila Novak kaj ŝi ebligas la daŭrigon de prudenta politiko kiu

ebligas realisman pozicon de Esperanto en EU.

Zlatko Tišljarić – Pajo

## UN LANĈIS ENKETON – ANKAŬ EN ESPERANTO



Unuiĝintaj Nacioj (UN) festas sian 75-jariĝon en periodo de grandaj defioj, inkluzive de la plej akra tutmonda sano-krizo en sia historio. Ĉu ĝi alproksimigos la mondon? Aŭ ĉu ĝi kondukos al pli grandaj dividiĝoj kaj malfido? Viaj opinioj povas fari diferencon. UN proponas plenigi enketilon en pluraj lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Viaj respondoj al ĉi tiu enketilo influos tutmondajn prioritatojn nun kaj estontece.

La enketilo estas ĉe jena adreso: <https://un75.online/?lang=epo>

Ĉi tiu artikolo aperis en la novaĵretejo La Ondo de Esperanto.

Ĉe represo aŭ citado bonvolu indiki la fonton:

La Ondo de Esperanto <https://sezonoj.ru/2020/06/un-6>

### Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 30-an de junio 2020

Redaktoro: Zlatko Tišljar

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

